



Yagiô

MONATA INFORM-BULTENO DE
ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

Edifício Goiás, s/603 - tel: 225-4761

Caixa Postal 04-0406 - 70000 BRASÍLIA

ARQUIVAR

SPECIALA NUMERO - MAJO 1980

MOTIVO DE ĈI-TIU SPECIALA NUMERO

Kiel antaŭvidite, okazis la 26-an de Aprilo en nia Asocio, la prelego de Giuseppe Grattapaglia: "LA SIGNIFO DE UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN NIA ĈEFURBO". Ĉi estis vera alvoko al la konscienco de ĉiuj lokaj esperantistoj k eĉ de ĉiu esperantisto de nia lando pri la graveco de la entrepreno, la respondeco k precipe pri la laborado kiu atendas nin. Tial la estraro de EAB decidis, kun la permeso de la preleginto, aperigi la tekston en ĉi tiu speciala numero por ke ĉiu legu, meditu kaj REAGU!

LA SIGNIFO DE UNIVERSALA KONGRESO EN BRASÍLIA

Mi deziras alparoli hodiaŭ la esperantistojn de nia urbo, kiuj neniam partoprenis Universalan Kongreson de Esperanto. Ili estas la pli-multo ĉi tie kaj pro tio estas necese, ke ili estu detale informitaj pri la signifo de la 66-a Universal Kongreso de Esperanto, kiu okazos en nia urbo.

Estas necese, ke ili - ke ni ĉiuj - konsciuj pri la granda respondeco, kiun ni alfrontas. Ni ĉiam memoru, ke la invito por la kongreso estis farita je nomo de nia Asocio kaj ke, vole-ne-vole, ĉiuj ĝiaj membroj estas envolvitaj kaj havas la moralan devon subteni kaj partopreni en la organizado. La Loka Kongresa Komitato estas la esprimo de la forto de Asocio, kiu "kuraĝis" inviti la kongreson, sed ni ne lasu la tutan laboron kaj respondecon, nur sur la ŝultroj de tiuj homoj. Ni konsideru la kongreson NIA kaj agu konsekvence.

En la longa kaj ofte malfacila historio de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, la 66-a en Brasília havos apartan signifon, ĉar la esperantista popolo kunvenos unuafoje sude de ekvatoro! Sendube oni povus vidi en tio okultan signifon: la semoj de la lingvo de frateco enradikiĝas en la suda hemisfero de nia planedo, kvazaŭ kiel pravigo, ke tempo alvenis por ke nova civilizacio elmigru, el la malnova kontinento Eŭropo, al la nova mondo!

Tamen, la motivoj, kiuj instigis Universalan Esperanto-Asociacion akcepti nian inviton transformi Brasília-n en unusemajnan Esperantujon, estas multe pli kontingencaj. Se oni superrigardas, ekzemple, la statistikon de la individua membraro de UEA en 1979, kiu proporcie respegulas la distribuon de la esperantistoj en la mondo (almenaŭ en la t.n. "okcidenta mondo"), oni rimarkas, ke Brazilo okupas la sepan lokon, laŭ graveco, post Francujo, Svedujo, Germanujo, Nederlando, Usono kaj Japanujo, kaj ke la nombro de la brazilaj individuaj membroj de UEA reprezentas 5,48% de la totalo en 91 landoj.

Ĉar en la ses landoj, kiuj superas Brazilon, jam okazis, eĉ plurfoje, Universal Kongreso, estas do logike kaj saĝe, ke la vico apartenu nun al nia lando.

Ankaŭ la elekto de Brasília ne estas hazarda. Ekzistas forta paralela komparo inter Esperanto kaj Brasília. Ambaŭ estis konsiderataj "artefaritaj" kaj por ambaŭ oni profetis fiaskon. Tamen, kaj spite al profetoj, ambaŭ prosperas: la lingvo en la koro de la homaro kaj la urbo en la koro de Brazilo!

Celo de Universal Kongreso de Esperanto estas esence duobla.

- Unuflanke, ĝi estas ampleksa kultura manifestacio, kiu abunde pruvigas pli ol mil disertacioj, la vivantecon de nia lingvo kaj movado. Ĝi estas la montrofenestro de niaj konataj tezoj pri la solvo de la lingva problemoj en la mondo.

- Aliflanke, Universal Kongreso estas unika okazo por vaste debati

la problemojn de nia movado kaj nian tutmondan strategion. Ĝi estas la kunfandiĝo de la mondo en unu salono, la festivalo de tiu idealisma parto de la homaro, kiu konkrete celas al unuigo.

Oni prave diris, ke partoprenanto de Universala Kongreso, neniam plu forlasos Esperanton, ĉar tie li trovis la ĝustan etoson kaj instigon por persisti en la disvastigo de la Internacia Lingvo.

El tio ni konkludas, ke se ni bone organizos nian 66an Universalan Kongreson, ni troviĝos je la fino de 1981, antaŭ jena situacio:

. Nia urbo kaj parte ankaŭ nia lando estos multe pli konkrete informitaj pri la vera esenco de Esperanto kaj pli malfermaj al niaj klopodoj ĝeneraligi la uzadon de la lingvo;

. Tuta generacio de brazilaj esperantistoj, "baptitaj" per la Universala Kongreso, estos pli konsciaj kaj pretaj kunlabori sur la spuroj de nia granda pioniro Ismael Gomes Braga.

Jen do nia respondeco: UNUE, aranĝi epok-faran sud-hemisferan Universalan Kongreson;

DUE; saĝe utiligi ĝian eĥon por doni decidon antaŭenpuŝon al la brazila Esperanto-movado!

Kaj kio distingas bone organizitan Universalan Kongreson de Esperanto disde senlora samtitola manifestacio?

Al via konsidero mi submetas kelkajn opiniojn maturiĝintajn dum 18-foja partopreno en Universalaj Kongresoj de Esperanto:

. Bona Kongreso estas tiu, kie la urbo estis antaŭe preparita por la evento kaj kie nia manifestacio ne perdiĝas en la indiferenteco. Sekve ni devos klopodi ricevi la apogon de gazetaro, radio kaj televido, tra la tuta urbo devos svari aŭdiŝoj, rubandoj, anoncoj kaj ĉirkaŭ la kongresa centro devos flirti flagoj en festa atmosfero;

. Bona Kongreso estas tiu, kie la partoprenantoj alvenintaj el forraj landoj, trovas tuj la necesan "lingvan asiston". Sekve, ek de la flughaveno ĝis la hoteloj, de la aŭtobusa stacidomo al la kongresejaj servoj, la kongresanoj devos povi interkompreniĝi per Esperanto.

Palaj kongresoj estas tiuj, kie, por aĉeti poŝtmarkon aŭ bieron, la bedaŭrindaj batalantoj por mondlingva idealo devas uzi la fingrojn aŭ la anglan lingvon!

Tial, estos nia tasko dum la jaro antaŭ la kongreso, vastaskale instruadi bazajn elementojn de Esperanto al ĉiuj kategorioj de homoj, kiuj estos en kontakto kun la kongresanoj; turismaj gvidantoj, Hoteloficistoj, kelneroj, taksiistoj, banko kaj poŝtoficistoj, policanoj, ktp. Kaj se niaj klopodoj tiurilate ne estos sukcesaj, ni mem, kune kun kelkdeko da volontuloj, devos deĵori almenaŭ en la kongresejo kaj en kelkaj aliaj strategiaj lokoj por ke ĉiuj servoj povu funkcii en Esperanto.

Ni devos oferi nin, jam antaŭsciente, ke por ni la kongreso ne estos ĝuo, sed eble nur peza kaj rutina laboro.

. Epok-fara kongreso estas tiu, kie la kulturaj, turismaj kaj artaj aranĝoj estas stampitaj per akurateco en la horaroj kaj profesia nivelo en la disvolviĝo. Proksimuma improvizemo ne helpas al niaj celoj kaj ankaŭ pri tio ni devos multe streĉi niajn organizajn fortojn.

Pri la Unua Universala Kongreso de Esperanto en la norda hemisfero en la jaro 1905a oni verkis libreton kun la titolo:

BOULOGNE 1905 - TESTO KAJ TRIUMFO - (eldonita en 65).

En ĝi oni legas "... Alveninte en Boulogne oni tuj vidis..." (p. 9)

Ni deziru al ni mem ke eble post aliaj 60 jaroj oni eldonos alian libreton:

"BRASÍLIA 1981 - KOMENCO DE LA FINA VENKO" !

G.G.

JEN VI, ANTAŬ LA INSTIGO, REAGU ! ! !

La substrekoj estas de la Redakcio